

# LA SUNO HISPANA

Direktoro-Administranto ★ Director-Administrador

RAFAEL DUYOS

CIRILO AMORÓS, 28 = VALENCIA

La Redakcio korektos la manuskriptojn laŭbezone, kaj la nepresitajn ĝi ne resendos

**ENHAVO:** Cirkulera-letero de D ro L. L. Zamenhof.—Esparto.—Moralaj aforisimoj de Seneka.—Sección gramatical.—Kuriozaĵoj.—Noticias del extranjero.—Sciigoj el Hispanujo.—Novaj gazetoj.—Bibliografio.—La ombro (daŭrigo).—Spritaĵoj—Niaj frataj vizitantoj.—Anoncoj.

## Cirkulera-Letero de D.<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof

Al ĉiuj Esperantistoj

Varsovio, la 18.<sup>an</sup> de Januaro 1908.

En la jaro 1900, kiam la esenco de la internacilingva afero estis ankoraŭ tro mal-multe konata kaj la mondo pensis, ke ekzistas diversaj lingvoj internaciaj, kiuj inter si batalas, sinjoroj Couturat kaj Leau en Parizo fondis «Delegacion», kies celo estis: peti la Internacian Ligon de Akademioj, ke ĝi esploru, kiu el la ekzistantaj artefaritaj lingvoj taŭgas plej bone por la rolo de lingvo internacia, aŭ elekti mem komitaton, kiu esplorus tiun ĉi demandon. Kvankam, de la jaro 1900 ĝis nun, la vivo jam *mem* solvis la diritan demandon, tamen, por plenumi sian promeson, la Delegacio, en Oktobro 1907, kunvokis komitaton, kiu devis elekti lingvon internacian. Sed bedaŭrinde la komitatanoj ne ĝuste komprenis sian taskon, kaj, elektinte Esperanton, ili decidis fari en ĝi *reformojn*, forgesante, ke tia tasko tute ne estis kaj neniam povis esti komisita al ili. Tiu ĉi tre bedaŭrinda decido estis kaŭzita de kelkaj tre gravaj malkompreniĝoj:

1º Oni forgesis, ke la afero de lingvo internacia estas nun ankoraŭ en la stato de *propagando*; ke la mondo ne akceptas lingvon internacian ne pro tiuj aŭ aliaj ĝiaj *detaloj*, sed nur pro malkonfido al la *tuta* afero; ke sekve nun ĉiu vera amiko de lingvo internacia devas absolute silenti pri siaj personaj gustoj kaj gustetoj, kaj ni ĉiuj devas antaŭ ĉio labori en plej severa *unueco*, por ke ni akiru por nia afero la *konfidon* de la mondo. Kiam nian aferon prenos en sian manon ia granda *forto* (ekzemple la registaro de la ĉefaj landoj), kiu per sia potenco povos doni al ni ne senvalorajn tro memfidajn vortajn promesojn, sed planan *garantion*, ke ĝi alkondukos nian aferon al la celo *pli certe* ol ni kaj ke ĝi ne faros facilanime iajn decidojn, antaŭ ol ili *tute mature* kaj perfekte estos pripensitaj kaj praktike *elprovitaj* kaj *fiksitaj*, tiam ni povos konfide transdoni al tiu potenca forto la sorton de nia afero; sed se *privataj* personoj, kiuj havas nek ian aŭtoritaton, nek ian forton, postulas, ke ni foilas la vojon, kiun ni paciencie kaj sukcese sekvis en la daŭro de multaj jaroj, kaj ni ko-

mencu plej danĝerajn rompajn eksperimentojn, ĉiuj veraj esperantistoj energie protestos. Nun, kiam ni estas ankoraŭ tro malfortaj, ni povas atingi nian celon nur per *severa disciplino* kaj per *absoluta unueco*; alie ni pereigos nian tutan aferon por ĉiam, por *ĉiam*; ĉar kiu scias, kun kia grandega malfacilego kaj per kia superhome pacienca dudekjara laborado de multaj miloj da personoj estas atingita la nuna favora rilato de la mondo al nia afero, tiu komprenas, ke se, pro interna malpaco, Esperanto nun pereus, la mondo jam neniam, *neniam* volos ion aŭdi pri la nova lingvo internacia, eĉ se ĝi estus ne senviva teoria produkto de multaj reciproke malproksimaj kapoj, sed la plej genia kreitaĵo! Mi ripete memorigas tion ĉi al la reformistoj, mi ripete kaj insiste petas ilin, ke ili pripensu, kion ili faras, ke ili ne ruinigu tiun grandan kaj gravan aferon por kiu ni ĉiuj laboras kaj por kies ebla pereco la posteuloj iam severe nin juĝas.

2° Oni forgesis, ke ne sole eĉ en sia nuna formo Esperanto en la praktiko montriĝis perfekte taŭga por sia rolo kaj ke plibonaĵo povas fariĝi danĝera malamiko de bonaĵo, sed ke se eĉ *efektive* aperus la neceseco plibonigi Esperanton, la solan kompetentecon kaj rajton por tio ĉi havas ne flankaj personoj, sed nur la *esperantistoj m.m.* Kaj en ĉiu momento, kiam plibonigoj montriĝos efektive necesaj kaj ĝustatem-paj, la esperantistoj tre facile *povas* ilin efektivigi. Ĉar ĉiu rakontado pri ia baro, kiun kvazaŭ prezentas la Bulonja Deklaracio, aŭ pri ia kvazaŭa senviveco kaj senforteco de nia Lingva Komitato, estas simpla malvero, per kiu oni penas fortimigi de ni tiujn personojn, kiuj ne konas bone la staton de la aferoj.

Ĉiu, kiu legis la antaŭparolon de la «Fundamento de Esperanto» scias tre bone, ke ĝi ne sole ne prezentas ian baron kontraŭ la evolucio de la lingvo, sed kontraŭe, ĝi donas al la evolucio tian grandegan liberecon, kiun neniu alia lingvo iam posedis eĉ parte. Ĝi donas la eblon, se tio estus necesa, iom post iom eĉ ŝanĝi la tutan lingvon ĝis plena nerekonobleco! La sola celo, kiun la Fundamento havas, estas nur: gardi la lingvon kontraŭ *anarkio*, kontraŭ reformoj *arbitraj* kaj *personaj*, kontraŭ danĝera *rompado*, kontraŭ forjeto de malnovaj formoj antaŭ ol la novaj estos sufiĉe *elprovitaj* kaj tute definitive kaj sendispute *akceptitaj*. Se la esperantistoj ĝis nun tre malmulte faris uzon de tiu granda libereco, kiun la Fundamento al ili donas, ĝi ne estas kulpo de la Fundamento, sed ĝi venas de tio, ke la esperantistoj komprenas tre bone, ke lingvo, kiu devas tratabi al si la vojon ne per ia potenca dekreto, sed per laborado de amasoj, povas disvolviĝi nur per tre singarda vojo de natura *evolucio*, sed ĝi tuj mortus, se oni volus ĝin disvolvi per kontraŭnatura kaj danĝeriga vojo de *evolucio*.

Cetere, se la Bulonja Deklaracio efektive prezentus ian malbonaĵon aŭ neprecizajn, kiu do malpermesas, ke iu proponu ĝian ŝanĝon aŭ eĉ ĝian tutan forigon? Jes, tiuj sinjoroj, kiuj sub la influo de agitantoj diras, ke la «Fundamento» prezentas «eternan baron kontraŭ la evolucio de Esperanto», parolas pri afero, kiun ili tute ne konas!

Ĉar la Lingva Komitato ĝis nun faris ankoraŭ nenium rompon en la lingvo, tial la reformistoj ĝin kulpigas, ke ĝi estas senviva, senforta, senaŭtoritata, sentaŭga! Sed se ĝi estas malbona, kiu do malpermesas, ke la esperantistoj mem ĝin reorganizu? Anstataŭ semi malkontentecon, malpacon kaj ribelon. Ĉu ne estus pli bone, se iu el la malamikoj de la nuna Lingva Komitato prezentus projekton de reorganizo de tiu ĉi komitato? Se la projekto estos bona, ĝi ja certe estos akceptita; mi povas eĉ sciigi la malkontentulojn, ke la prezidanto de la Komitato mem preparas nun projekton de reorganizo, kiun li intencas prezenti al la plej proksima kongreso. Per vojo de paco kaj harmonio ni ĉion povas krei, per vojo de malpaco kaj ribelo ni ĉion nur detruos.

Por fari reformojn en Esperanto, la «Delegacia Komitato» ricevis komision nek de la esperantistoj, nek de siaj propraj delegintoj (kiuj ne sole ne donis, sed eĉ ne *povis* doni tian strangan komision); siajn proprajn, de neniu rajtigatajn postulojn de

reformoj—kiuj apogis sin sur zorge kolektitaj voĉoj de kelka nombro da malkontentuloj, sed tute ignoris la opinion de multaj dekmiloj da personoj, kiuj estas kontraŭ ĉiuj ŝanĝoj—la Delegacia Komitato prezentis al la esperantistaro en formo tre ofenda, postulante, ke la tuta multemila kaj longe laborinta esperantistaro akceptu la decidojn, kiujn kelkaj flankaj personoj ellaboris en la daŭro de 8-10 tagoj; ili eĉ malhumile postulis, ke tiuj decidoj estu akceptataj *tuj*, ne atendante la esperantistan Kongreson; tial la sola respondo, kiun ni devis doni al la postulantoj, estus simpla kaj tuja rifuzo. Sed ĉar troviĝis personoj, kiuj per ĉiuj eblaj rimedoj komencis grandan kaj lertan agitadon inter ĉiuj esperantistoj, penante per ĉiuj fortoj ruinigi la harmonion, kiu ĝis nun regis inter ni, penante semi malpacon kaj malkontentecon kaj kredigi al ĉiu aparte, ke ĉiuj postulas reformojn, nur la ĉefoj kontraŭstaras; kaj ĉar ni komprenis tre bone, kiel pereiga povas fariĝi por nia tuta afero ĉia publika malpaco kaj skismo, precipe se ĝi al la nenion scianta publiko estas tute malvere prezentata kiel «deziro de multaj sociotoj»; tial ni en la daŭro de tri monatoj faris ĉion, kion ni povis, por kvietigi la ribelantojn en ia paca maniero. Ni multe korespondis kun ili, penante klarigi al ili, kiel danĝeriga ilia agado estas por tiu afero, kies amikoj ili sin kredas; ni prezentis la demandon al la voĉodnato de ĉiuj membroj de la Lingva Komitato; kaj kiam la Lingva Komitato rifuzis akcepti iliajn strangajn kaj tro grandajn postulojn, ni eĉ decidis, ke ni *mem* en nia propra nomo prezentos al la esperantistoj iliajn plej ĉefajn postulojn, kvankam ni tute ne vidas en ili ian necesajon; sed ni nur deziris, ke ĉio estu farata sen rompad, per vojo laŭleĝa; ke ĝis la komuna akcepto la novaj formoj estu rigardataj ne kiel devigaj, sed nur kiel permesataj, kaj ili ricevu forton nur tiam, kiam la Lingva Komitato ilin aprobas kaj Kongreso esperantista donos al ili sian sankcion.

Sed ĉiuj niaj penoj de pacigo nenion helpis. La postulantoj respondis, ke por ili ne estas aŭtoritata nia Lingva Komitato, nek nia Kongreso, kaj ili rezervas al si plenan liberecon de agado.

Tiam ni estis devigitaj rompi ĉiun intertraktadon kaj sciigi, ke la «Delegacia Komitato» por ni plu ne ekzistas. Laŭ la propra tute preciza programo de la «Delegacio», la Komitato ricevis de siaj delegintoj la komision nur *elekti* ligvon; de la momento, kiam tiu elekto estis farita, la «Delegacia Komitato» ĉesis ekzisti kaj restis nur kelkaj *privataj* personoj, kiuj—laŭ siaj propraj vortoj—fariĝis nun esperantistoj. Sed kiam tiuj kelkaj novaj esperantistoj, kiuj aliĝis al Esperanto nur antaŭ malmultaj semajnoj, ekdeziris dikti leĝojn al la tuta popolo esperantista, kiu laboras jam pli ol dudek jarojn, kaj ĉiuj niaj admonoj nenion helpis, tiam ni simple lasis ilin flanke.

Ni estas konvinkitaj, ke tiuj kelkaj scienculoj, kiuj lasis sin entiri en reton, baldaŭ komprenos la eraron, kiun ili faris; ili baldaŭ komprenos, ke nia gravega kaj malfacilega afero povas atingi sian celon *nur per severa unueco*; kaj pro la bono de ila amata ideo ili baldaŭ discipline aligos siajn fortojn al tiu komuna granda armeo, kiu sen personaj ambicioj, en plena harmonio, kaj kun ĉiam kreskanta sukceso, pacience oboras jam tiom multe da tempo. Kiel ĝis nun, tiel ankaŭ plue, ni, esperantistoj, ros trankvile nian vojon.

L. L. ZAMENHOF.

\* \* \*

*Hispana Societo*, la hispanaj «Esperantistaj Grupoj» kaj tiu ĉi modesta gazeto restos ĉiam fidelaj al nia respektinda Majstro. Plej malmodeste la reformistoj kredas ke la plej granda nombro da esperantistoj aliĝos al sia decido; la malon montras, en Hispanujo, multe da poŝtkartoj kaj leteroj de ni ricevitaj.

Antaŭen, do. Al la Lingva Komitato ni plene fidas pri la lingvaj demandoj; nia tasko, tiu de la laboremaj kaj duarangaj esperantistoj, estas la disvastigado de la lingvo. Antaŭen!

Kaj nun, unu demando. Kiu estas sinjoro *Ido*? Kial li kaŝas sin tiel longatempe?

## ESPARTO

Tiu ĉi titolo, kara leganto, ne estas erara. Mi ne volas nun paroli pri nia ideo Esperanto, sed pri afero vulgare komerca, Esparto, kaj ĉar ĝi estas «cosa de España» mi pensis ke povas esti por vi interese iom legi pri ĝi verkita de samideano kiu elkonas la aferon kaj ĝian ekspluatadon.

Nu, Esparto estas herba kreskaĵo, nomita botanike *Macrochloa*, aŭ *Stipa Tenacissima*. La Araboj nomas, ĝin *Alfa*, vorto kiu rememorigas la hispanan *Alfalfa* per kiu ni nomas Lucernan Trifolion (*Medicago Sativa*). En Eŭropo esparto kreskas nur en Hispanujo, kaj el tiu lando nur en la suda regiono, precipe en la provincoj Murcia, Granada, Almeria, Albacete kaj Jaen. Ankaŭ en Afriko ĝi kreskas en la tuta norda parto de Maroko ĝis Egiptujo, sed kiel komercaĵo ĝi estas konata sole en Alĝerujo, Tripolujo kaj iom en Tunisujo. La *gramineo* pritraktita kreskas sur montaj landoj kies tero estas iom kalka kaj fera. Ĝi estas nekulturata kreskaĵo kaj la bienhavantoj en nia lando preskaŭ ĉiuj malzorgas pri ĝia konservado spite la tre efektiva valoro kiun ĝi posedas. Por tio, precipe, la rikolto malkreskas jaron post jaro; kredeble por klarigi kaj pardonigi tiun nezonon la terlaboristoj diras ke «ne estas eble» semi esparton; sed tio estas tute nevera. Sendube la semo estas tre malgrandeta kaj malfacile kolektebla, kaj ĝi donas rikolton nur post deko da jaroj, tial ke la penado semi ŝajnas vana. Precize ĉar esparto kreskas en teroj malriĉaj, sekaj kaj ŝtonplenaj ĝi meritas multe pli da estimo. Sed tio ĉi ankaŭ estas «cosa de España».

Feliĉe, ĝi estas forta, sana kreskaĵo kiu rezistas ekstremajn gradojn da varmeco kaj da malvarmeco. Aliamaniere ĝi estus malaperinta en Hispanujo antaŭ centjaroj. Certe estas ke esparto kreskadus (ĉar oni lasas ĝin kreski), sur teroj kiuj estas kapablaj produkti pli valorajn rikoltojn. Tamen pro la multegaj, kejmaj uzoj kiujn la kamparanoj faras de esparto ĝia efektiva valoro estas por ili malfacile kalkulebla kompare kun aliaj rikoltoj vendotaj por mono.

En kelkaj regionoj oni ne rikoltas la esparton tie kreskantan aŭ nur la kvanton kiun la laboristoj bezonas por siaj hejmaj aferoj. Malgraŭ tio, mi kalkulas ke la ĉiujara kolekto de esparto en nia lando sumas 150 milionoj da kilogramoj, kies valoro en vendejo estas, proksimume, 16 milionoj da pesetoj (aŭ frankoj.) El tiu grava sumo kvar kvinonoj konsistas el salajroj, transportaj elspezoj, k. t. p., nur kvinono estas profito por la bienhavantoj—(kiuj nenion elspezas).

Esparto kreskas sur la stepoj dissemita laŭ aroj, nomitaj hispane «atochas»; ĉiu «atocha» kreskas iom aparta de la aliaj, kaj konsistas el unu sola planto aŭ fasko da plantoj. Ĝi atingas altecon de unu metro, sed pli ofte la bledoj mezuras nur duonmetron, kaj la floranta trunko, aŭ kano, povas esti alta je du aŭ tri metroj. La maturaj, sekaj, bledoj estas tute rondaj, glataj, neartikitaj kaj tre fortaj. Ili estas flekseblaj kiel fadeno, sed neniel streĉeblaj aŭ rompeblaj per la neprojektita mano. Tiuj ecoj donas al esparto ĝian rimarkindan valoron en la Industrio. Kuirita kaj kombita (kiel oni laboras ankaŭ kanabon, linon k. c.), esparto estas ŝpinita, teksita kaj plektita por fabriki ŝnurojn, matojn, aŭ korbojn el mil specoj. Ankaŭ ne kuiritaj, en ĝia natura stato, oni fabrikas el ĝi similajn aferojn sed el pli maldelikataj kvalitoj. Fine, tiel ĝeneral kaj diversa estas en tiu ĉi regiono la ĉiutaga uzado de esparto ke mi nur povas kompari ĝin al la Kokusarboj en Koralaj Insuloj, kies enloĝantoj ĉerpas el tiu bonfara kreskaĵo manĝon, trinkon, veston kaj domon.

Spite tiom da alfarajoj donitaj al esparto en nia lando restas ĉiam *superavit*, kalkulebla kiel unu triono da la ĉiujara rikolto. Tio ĉi estas proksimume 50.000 tunoj (po 1.000 kiloj) kiuj estas konstante elportataj Anglujon, aŭ pli ĝuste Skotlandon, ĉar Anglujo mem konsumas nur malgrandan proporcion de la hispana rikolto. La

Angloj de kvardek jaroj, utiligas esparton, kiel ĉifonaĵojn, por la fabrikado de papero, kaj estas kurioze ke neniu alia fremda lando sciis eltiri profiton el fibro kiu tiel bone taŭgas por tiu industrio. Kredeble tiu fakto estas klarigebla, sed la kaŭzoj estas multaj kaj mi ne povas nun pritrakti ilin ĉar tiel mia artikoleto fariĝus tro longa kaj laciga. Sufiĉu diri ke Grand-Britujo aĉetas al ni ĉiujare 50 milionoj de kilogramoj da esparto, kaj por ili pagas al ni kvin milionojn da frankoj. Antaŭ tridek jaroj, laŭ mia memoro, esparto havis en Grand-Britujo trioblan prezon, sed pro diversaj cirkonstancoj, precipe la konkurenco de lignopasto, ni iom post iom deviĝis akcepti prezojn ĉiam malpli altajn.

En Nord-Afriko ekzistas vera «oceano» da esparto, sed kvankam el tiu mondparto estas forsendita tri-kvar fojojn pli ol el Hispanujo, oni povas diri ke nur la bordero estas tuŝita. Kiam la prezo en Anglujo plialtiĝos kaj la facilajoj por transportado pligrandiĝos la tiea komerco nepre kreskos multe. Afrika esparto estas pli lignema ol la hispana; tial ĝi enhavas malpli da fibro utiligebla, sed la elspezoj necesaj por pretigi ĝin por paperfabrikado estas multe malpli ol en Hispanujo. Tial, ĝi faras al nia esparto, same kiel lignopasto, fortan konkurencon en fremdaj vendejoj.

Pensu la leganto ke esparto estas nur ero sensignifa, preskaŭ nekonata kaj tute nezorgata, el nia nacia riĉeco kaj ke spite tio ĉio ni ĉerpis el ĝi dum la lastaj dudek jaroj pli ol cent milionoj da frankoj, kaj li konvinkiĝos ke Hispanujo estas, aŭ devas esti, unu el la plej riĉaj nacioj en Eŭropo. Feliĉe Dio zorgas pri ni. Ni donu dankon al Li.

N. MACLEAN.

## Moralaj aforismos de Seneka

Tradukis Pérez Alcorta.

1. En la malbono nur povas esti unu bono; la honto esti ĝin farinta.
2. Sufiĉus, kiel rimedo, esti plibonaj ol la malbonaj.
3. Ne estas tre granda la animo de tiu, al kiu plaĉas la teraj aferoj.
4. Ni penu forgesi tion, kio alportita al la memoro malgajigas nin.
5. Necesaj estas novaj favoroj de la sorto por konservi la feliĉon.
6. Estas dolore, ke ni komencas la vivon, kiam ni mortas.
7. Facile oni akiras tion, kio estas sufiĉa por vivi.
8. La spertado estas necesa por scii io ajn.
9. La kuraĝo ambicias ĉiam la danĝerojn.
10. Malgranda ilaro sufiĉas por bone vivi.
11. Ĉiuj samopinias kontraŭ la malbonfarado.
12. Por virino, kiu estas malbela, estas argumento sin nomi ĉasta.
13. Neniu estas tiel humila, ke li ne havas povo por fari al iu malutilon.
14. Virta pruvo estas, malplaĉi al la malbonuloj.
15. Tro frue mortas la homo, por ke li povu koni la nemortebajn aferojn.

## SECCIÓN GRAMATICAL

**M. M.**—No exagere V. su preocupación; claro está que de algunos de esos compuestos de preposición y raíz verbal podrá V. encontrar el equivalente exacto castellano, pero no de todos. *Iri*=ir; *eniri*=ir dentro, entrar; *eliri*=ir fuera, salir; pero para expresar esas ideas compuestas *ir dentro*, *ir fuera*, tenemos en castellano voces especiales, *entrar*, *salir*, lo que no ocurre, en general, para todos los demás compuestos que se pueden formar en Esperanto. Tomemos, por ejemplo, la raíz *glu'*=pegar, y traduzcamos las oraciones *pega esto a la pared*, *pega esto sobre la tapa del libro*, *pega estos dos trozos de madera*. El verbo en castellano no varía, y bien podíamos traducirlo al Esperanto por *glui* en las tres frases, como V. propone; pero ¿por qué no usar de las preposiciones que anticipan con su sentido la idea que luego ha de expresarse? Usemos, pues, en aquellas tres oraciones los verbos *alglui*, *surglui* y *kunglui*, sin que esté sujeto á desfavorable crítica el uso sencillo de la raíz *glu'*.

**H. D.**—*Mi desegnis la arbon grandan*=he dibujado el árbol grande, el más grande; *grandan* en esa frase concierne en caso con el substantivo, determinando por su magnitud el árbol que yo he dibujado, el grande y no otro. *Mi desegnis la arbon granda*, expresa que en el dibujo le he dado al árbol grandes proporciones. —No le puedo dar regla fija para interpretar el sentido que dan á la frase esos adjetivos en nominativo que acompañan á un substantivo en acusativo, pues dependen del verbo; compare V. las siguientes frases y V. verá que, sin regla alguna, se comprenden en seguida el concepto que expresan:

*Mi juĝis tiun ĉi homon senkulpan.*—*Mi juĝis tiun ĉi homon senkulpa.*

*Mi trovis vian afablan poŝtkarton.*—*Mi trovis vian poŝtkarton afabla*

*Mi nomis mian filon Adolfon.*—*Mi nomis mian filon Adolfo.*

Vea V. ahora los siguientes frases:

*La Kutimo faris lin indiferenta.*—(Zamenhof.-Hamleto. V. 1.)

*Kion vi intencas nun fari por vin montri inda filo?*—(Zam.-Hamleto. IV. 7.)

Como la mayor parte de las consultas recibidas se refieren al acusativo en sus diferentes clases, basta con lo apuntado para contestar á su pregunta, pues en el número próximo dedicaremos la «Sección Gramatical» al estudio completo del acusativo, y hablaremos con más extensión del acusativo de claridad.

HISPANO.

## Kuriozaĵoj

### LA SUNO HISPANA KAJ LA ANGLA PLUVO

El kurioza statistiko, kiun publikigas pariza gazeto ni elĉerpas la jenajn kuriozotojn.

La lando plej sunita de Eŭropo estas Hispanujo, kie oni kalkulas ĉirkaŭe 3.000 horojn jare je hela suno.

Italujo havas ĉirkaŭe 2.300; Francujo, 2.200; Germanujo, 1.700 kaj Anglujo nur 1.400, tio estas, la duonon de Hispanujo.

Kontraŭe, Anglujo estas unuavice koncerne la pluvo, ĉar sur Skotujo oni kalkulas altecon da akvo je 8.890 milimetroj; Londono havas cent-sepdek-ok pluvajn tagojn are; sur la plej malsekaj regionoj el Germanujo oni kalkulas ne pli ol 1.290 milimetroj da akvo.

## Noticias del extranjero

**Alemania.**—*La Kvaro por la Kvara*, constituido como dijimos en el número anterior, ha empezado con éxito sus trabajos. La fecha del Congreso es del 16 al 22 de Agosto. Como población esperantista se ha elegido «Weisser Kirsch» (Ciervo blanco), pueblecillo encantador, próximo á Dresden y conocido en todo el mundo como excelente sanatorio. La conquista esperantista de la población ha empezado. El 11 de Noviembre se celebró la primera reunión preparatoria de la Sociedad de Dresden «Esperanto». El presidente de la misma y *kvarano* Dro. Schramm dió una conferencia sobre los trabajos efectuados y pendientes de realización. Asistieron muchísimas personas influyentes de la población y el Municipio prometió ayudar eficazmente al Congreso. Veinte policías y también comerciantes y fondistas asisten á los cursos organizados por la sociedad citada. Puede, pues, asegurarse que Dresden se prepara dignamente para festejar y atender á los congresistas. La propaganda continúa en todo el imperio y se han fundado grupos en Bonna, Rh., Danzig, Erfurt, Königsberg, Reval y Zittan.

**Inglaterra.**—Contando los grupos últimamente fundados en Halifax, Hawich High, Wycombe, Middlesbrough, Stockton, Exworth y el segundo grupo de Norwich, los afiliados á la British Esperanto Association dan un total de 98.

Para demostrar la laboriosidad de nuestros compañeros ingleses baste decir que durante los meses de octubre y noviembre han dado en todo el Reino Unido más de cuarenta conferencias.

**Bélgica.**—Entre los trabajos de propaganda celebrados últimamente, con de notar las conferencias del teniente Cardinal en la Sociedad Esperantista de Bruselas, del profesor Frans Swagers en la Universidad popular, del comandante Lemaire en la Escuela Superior de Industrias de Charleroi, del Sr. Blanjan en Lacken y del abogado Sr. Joh. Jongen en Lieja. Se han fundado grupos en Charleroi, Boom y un segundo en Namur.

**Portugal.**—En el mes de Noviembre se fundó el primer grupo esperantista de Portugal en *Porto* con el nombre de Porta Grupo Esperantista (Largo do Laranjal r. Porto.)

**Estados Unidos.**—El muchísimo trabajo que hasta hoy pesaba sobre The American Esperanto Association para facilitar informes y vender libros, hizo pensar en la necesidad de que los grupos de los diversos estados se federasen por secciones. Illinois ha dado el ejemplo fundando la Illinois Asocio Esperantista el pasado Julio; todos los grupos del estado se han adherido, y se estudia la fundación de sociedades análogas en los demás estados. Se han organizado los siguientes grupos: de la Universidad de Pensylvania, Indianapolis Esperanto Society, Washington Esperanto Society, y Non nobis solum Esperanto, en Evansville, Ill.

**De todas partes.**—*La Revista Teosofista* de San Petersburgo publica una sección esperantista bajo la dirección del profesor de Esperanto E. V. Radvan-Ripinski.—En Parana (Brasil) se ha fundado un grupo.—Se ha abierto una oficina informadora en Fiume (Hungría) via della Riva, 2, dirigida por el Sr. Rudolfo Gilič.—En la India han fundado grupos en Bombay, Agra, Rawalpindi, Surat, Broach y Lamnagar.—Recibimos de Francia numerosas noticias que manifiestan el fervor con que nuestros vecinos prosiguen sus trabajos de propaganda; cursos, conferencias, artículos periodísticos, todos los medios son empleados para llevar el Esperanto al más pequeño rincón de la República.

# Sciigoj

## EL HISPANUJO

A la serio da novaj komitatoj elektitaj por 1908 de la hispanaj esperantistaj grupoj, kiun ni presigis en la januara numero, ni aldonas la jenajn:

*Cartagena.*—Presidentes Honorarios: Doctor Zamenhof, D. Ricardo Codorníu y D. José Carlos-Roca.—Presidente: D. Luis Calandre Lizana.—Vicepresidente: Don J. José Palacios.—Secretario: D. Andrés Rosique.—Vicesecretario: D. Juan Antón Cánovas.—Tesorero: D. Jerónimo Martínez.—Contador: D. Ernesto Vicente.—Bibliotecario: D. Eleusipo G. Castro.

*Santurce Antiguo (Vizcaya).*—Presidente: D. Guillermo de Gorostiza.—Vicepresidente: D. Tomás Guillén.—Cajero: D. Manuel Mas.—Secretario: D. Ramón A. Berdonces.—Vocales: D. Juan José Mendizábal y D. Jaime San Martín.

*Villacarrillo (Jaén).*—Presidente: D. Crescencio Gutiérrez Zapico.—Secretario: D. Laureano Muñoz Escobar.—Depositario-Contador: D.<sup>a</sup> Virginia del Barrio de Gutiérrez.—Vocales: D.<sup>a</sup> Enriqueta Fernandez de Muñoz, Srta. Amelia Zapico Díez, D.<sup>a</sup> Dolores Mercado de Setiey, D.<sup>a</sup> Ramona Giménez de Romero, D. Pedro Setiey Medina, D. Pedro Romero Cantero, D. Leopoldo del Prado Benavides, D. Benito Mármol Garvín y D. Luis Gutiérrez del Barrio.

*Barcelona.*—(Grupo «Paco kaj amo».)—Presidente: D. Juan Bausells.—Vicepresidente: D. Evaristo Brunet.—Secretario: D. Antonio Samper.—Vicesecretario: Don Francisco Isern.—Cajero: D. José Nován.—Contador: D. Pedro Ginabreda.—Bibliotecario: D. José Garbayo.—Recaudadores: D. Enrique Sanges y D. Jaime Montfort.

*Ferrol.*—Presidente: D. Javier Casares.—Vocal: D. Saturnino Montalbo.—Secretario: D. Emilio Bidegain.

Tiu ĉi lasta grupo estis fondata la 25<sup>an</sup> de Januaro.

El la paroladoj faritaj de niaj seniacoj propagandistoj dum la lasta monato, ni citas plezure tiun de S.<sup>ro</sup> Juan B. de Miguel Puig faritan ĉe la Barcelona Societo de Amikoj de la Instruado en la solena malferma kunsido okazinta la 19<sup>an</sup> de Januaro. Laŭ niaj sciigantoj tiu parolado estis vere elokventa kaj sprita. Esperanto estis per ĝi prezentata al multenombra aŭdantaro, en kiu ne mankis belaj virinoj, kaj certe multaj novaj samideanoj estis varbataj. Ni gratulas S.<sup>rom</sup> de Miguel kaj multe bedaŭras ne esti aplaŭdintaj lian majstran verkon.

## DE ESPAÑA

A la serie de nuevas juntas directivas elegidas en los grupos españoles para 1908 y que insertamos en el número de Enero, añadimos las siguientes:

Este último grupo se ha fundado el 25 de Enero.

Entre las conferencias dadas por nuestros incansables propagandistas durante el mes último, citamos con gusto la de D. Juan B. de Miguel Puig dada en la Sociedad Barcelonesa de Amigos de la Instrucción en la solemne sesión inaugural celebrada el 19 de Enero. Según nuestros informados, esta conferencia fué verdaderamente elocuente é ingeniosa. El Esperanto fué en ellas presentado al numeroso auditorio, en el que no faltaban hermosas damas, y con seguridad se reclutaron muchos nuevos adeptos. Nosotros felicitamos al Sr. de Miguel y sentimos muchísimo no haber aplaudido su magistral trabajo.



La respektinda prezidanto de Hispana Societo, S.<sup>ro</sup> Román Ayza, malfermis kurson nur por virinoj ĉe la Institucio por la virina instruado en Valencio. Ĉe estas tridek lernantinoj diversaĝaj, kiuj plej entuziasme entreprenis la laboron. Ni deziras al tiu ĉi kurso, la unua tiaspeca malfermita en nia lando, tiel bonan finon kiel komenco.

La ĉiusemajna revuo ilustrita eldonita en Barcelona *Orbi...* komencis publikigi esperantan tradukon de «La Patrino», de S.<sup>ro</sup> Santiago Rusiñol, verkisto tiel konata kaj ŝatata de la hispana publiko. La traduko estas korektege farita de nia bonega amiko S.<sup>ro</sup> Alfonso Sabadell, prezidanto de la Barcelona Grupo. Ni rekomendas la legadon de tiu verko.


En ĝenerala kunsido, la Hispana Societo p. p. Esperanto elektis la jenan direktan komitaton:

Presidentes Honorarios: Doctor L. L. Zamenhof y D. Ricardo Codorníu.—Presidente efectivo: D. Román Ayza.—Vicepresidentes: D. Vicente Inglada y D. Antonio L. Villanueva.—Secretario Honorario: P. Antonio Guinart.—Secretario efectivo: D. Rafael Duyos.—Cajero: D. Emilio Fabre.—Vocales: D. Augusto Jiménez Loira, D. Manuel Monteagudo, D. Manuel Benavente, D. Santiago García Oltra, D. Andrés Piñó y D. Vicente Marzal.

El respetable presidente de la Sociedad Española D. Román Ayza ha empezado un curso sólo para señoras en la Institución para la Enseñanza de la mujer en Valencia. Asisten treinta alumnas, que han emprendido el trabajo con el mayor entusiasmo. Deseamos á este curso, el primero de su clase abierto en nuestro país, tan buen fin como principio.

La revista semanal ilustrada, editada en Barcelona, *Orbi...*, ha empezado á publicar una traducción esperanta de «La Mare», de D. Santiago Rusiñol, escritor tan conocido y apreciado del público español. La traducción ha sido hecha con gran corrección por nuestro buen amigo D. Alfonso Sabadell, presidente del grupo de Barcelona. Recomendamos la lectura de esta obra.

En junta general, la Sociedad Española para la propagación del Esperanto ha elegido la siguiente junta directiva:



## Novaj gazetoj

La apero de nova hispana esperantista gazeto korgoĝigis nin, ĉar estas la plej bona pruvo pri la antaŭenirado de nia afero ĉe niaj gefratoj. *Stelo Kataluna* brilas de nun en la esperantista ĉielo per propra lumo. Bonvenata estu!

Ni dankas sincere la amajn vortojn senditajn al LA SUNO HISPANA kaj ĉar nova batalanto petas lokon por montri sian fidon kaj kuraĝon, noble kaj sincere, kun malfermitaj brakoj, ni akceptas lin en niaj vicoj.

\* \* \*

*La Algéria Informilo*, 8, rue d'Isly, Alger; sesmonata abono, 3'50 frankoj, jarabono, 6 frankoj; aperas ĉiujauĝe.

*Stelo Kataluna*, rambla de San Isidro, 30, Igualada (Barcelona, España). Jarabono: en eksterhispanaj landoj, unu jaro, 3 frankoj; unu numero, 0'30 frankoj; en Hispanujo, unu jaro, 2'50 pesetoj; unu numero, 0'25 pesetoj.

*Tutmonda Espero*, Paradís, 12, pral., Barcelona. Jarabono: 3 frankoj. Unu numero: 0'35 frankoj.

Al ĉiuj ni deziras sukcesplenan vivadon.

## Bibliografio

*Por la muzikamantoj.*—Ne nur literaturajn verkojn sed ankaŭ muzikajn ni ricevas preskaŭ ĉiutage. Estas eldonitaj la jenaj: *Birdoj forflugul*, valso el Guido Gezelle, tradukita de Seynaeve, muziko de Josée Guivy; prezo: 1'60 frankoj; aĉetebla en la Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépede, Paris.—*Himno*, kanto esperantista, dediĉita al D.<sup>ro</sup> Noel, poezio de Dombrowski, muziko de Josée Guivy; prezo: 1'25 frankoj; aĉetebla en la Presa Esperantista Societo.—*La Gaja Migranto*, kanto, poezio de L. Zamenhoj, kun angla traduko, muziko de Charles B. Mabon; prezo: 0'60 frankoj; aĉetebla ĉe S.<sup>ro</sup> C. B. Mabon, 144, Berkeley Street, Glasgow.—*Esperanto Marsĉj* de Aug. Etlinger, prezo nemontrita, aĉetebla ĉe S.<sup>ro</sup> Peder Friis, Frederiksborggade, 14, Kjobenhavn.

